

**Kluba Programo:****novembro:**

- 1 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)
- 8 Tim Owen: La krubalo (Diorama) (1800h Konsilantaro)
- 15 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 22 John Wells: Lingva Seminario (Diorama)
- 29 Literatura Vespero (IBIS Shoreditch)

**decembro:**

- 6 Lingva Vespero (IBIS Shoreditch)
- 13 Zamenhofa Vespero – gvidota de Anna Lowenstein (1800h Konsilantaro)

20,27, 3 Jan – Neniu kunveno

**januaro 2020:**

- 10 Novjara Festo (Dioramo)


**Esperanta Kalendaro:**

27 dec – 3 jan 2020: 18a Novjara Renkontiĝo (NR) Wiesbaden, Germanio. [www.esperantoland.org/nr](http://www.esperantoland.org/nr)  
25 jul – 1 aŭg 2020: 105a Universala Kongreso de Esperanto, Montreal, Kanado.  
<https://esperanto2020.ca/eo/chefpagho/>

**Aliaj anoncoj:**

*Prezentu ĉefprogrameron!* Se vi havas taŭgan temon kiu amuzos aŭ informos klubanojn, ne hezitu proponi vin al la program-sekretario.

Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 8a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.



Vidu: <http://esperanto.org.uk/news/shop>

**Verko de sindediĉo kiu plenigas vastajn fendojn en nia historia scio.**

Per ĉi tiu (anglalingva) referenclibro, Bill Chapman revivigis, tamen mallonge, homojn kiu estis alisence anonimaj siatempe. Ili hazarde estis tiuj homoj, kiuj sendis la nomojn al Varsovio, kaj poste Parizo, kun la promeso lerni Esperanton.

Iliaj nomoj estis registritaj en la *Adresaro de Esperantistoj*. Ĝis la lasta eldono (numero 29), publikigita en 1909, estis listigitaj 21,915 nomoj.

El tiuj pioniroj, Bill ĉerpis tiujn el la Brita Insularo, kaj traserĉis diversajn fontojn – oficialan homnombradon, telefonlistojn kaj *British Esperantist* kaj aliajn gazetojn – por aldoni personajn detalojn. Ofte estas simple ties metio, sed laŭokaze estas kromaj interesaj anekdotoj kaj alia informo pri laboro por Esperanto.

*Antony Rawlinson, post recenzo fare de Tim Owen*

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:  
Old Diorama Arts Centre, 201 Drummond Street,  
NW1 3FE (por kunveno kun programo);  
Ibis London City - Shoreditch Hotel, 5 Commercial St,  
London E1 6BF (por diskutvespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:  
18:00 lingvokurso(j) kaj/aŭ konsilantarkunsido  
19:15 - 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero  
20:15 - 20:45 paŭzo  
20:45 - 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la  
ĉefprogramero  
22:00 fino

Dioramo: Metrostacio: Warren St (linioj "Victoria",  
"Northern"), Euston Square ("Hammersmith & City",  
"Circle"), Regents Park ("Bakerloo").


Fervojo London Overground: Euston  
Busoj: 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390, 453, .  
Ibis (Shoreditch): Metrostacio: Aldgate East - uzu la  
eliron nro 2 (Toynbee Hall); (linioj "Hammersmith &  
City", "District"); Aldgate (linioj "Circle"  
"Metropolitan").  
Busoj: 15, 25, 115, 135, 242, 205, 254.

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.

Kluba retejo: <http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm>

Lokaj grupoj: Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346  
rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo  
020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.

Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta:  
Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14  
7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.



## Letero de nia Prezidanto

Karaj Klubanoj:

Mi esperas, ke vi fartas bone.

Mi taksas la lastajn du monatojn ege sukcesaj rilate al niaj kunvenoj. Ni ĝuis prelegon pri Slovakujo, kiu traktis kaj la historion kaj la nuntempan politikan situacion de tiu lando, ni aŭdis pri la laboro de la Esperanta movado kadre de UN kaj UNESKO (kaj iomete pri la retejo badnewsesperanto.com), kaj ni lernis multe en la lingvaj seminarioj. Aparte plaĉas al ni la kvanto de ĉeestantoj; tridek Londonaj Esperantistoj ĉeestis ĉe unu el la okazoj.

Mi certas, ke vi taksos la kalendaron de LEK dum la sekvontaj du monatoj tre interesa. Tim Owen prelegos pri "La krubalo" (ne kontrolu la vorton per PIV: se vi volas kompreni la signifon, vi devos ĉeesti!), kaj John Wells gvidos Lingvan Seminarion.

Aparte menciinda estas Vespero Zamenhof, kiu estos unu el la plej gravaj okazoj dum la jaro.

Ne estas tro frue komenci pensadon kaj planadon pri la Novjara Festo. La Festo ĉiam estas tre ĝuinda eblo por renkonti multajn membrojn de LEK en tre amikeca etoso, do mi esperas, ke multaj ĉeestos.

Do bonvolu partopreni !

*Chris Lewis*

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.  
Konsilantaro: Chris Lewis (Prezidanto), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti (Sekretario, Programo), Roland England, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).  
Adresoj: Renato Corsetti: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap\_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page: 7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry\_page@btinternet.com, anica\_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.